Karl Friedrich Müchler,

Down deep within the cellar

tradukita de John Oxenford

Down deep within the cellar, here
Against a butt I rest, Sir,
My heart of ev'ry care I clear,
And swear I'll have the best, Sir.

The cellar man taps any cask,
I choose by nod or winking;
He fills the glass, he loves his task
As I love drinking, drinking!

The demon thirst I could withstand,
Nay, if I could, would kill it;
I therefor take my glass in hand
And with good liquor fill it.

The world then wears a hue so gay,
It nearly sets me blinking;
All evil thoughts I scare away,
While drinking, drinking, drinking!

Bu oh, at ev'ry glass I drain,
That ragging thirst increases,
To drown it, tiplers strive in vain,
It never, never ceases.

Yet where's the odds if down I fall?
E'en now I feel a sinking;
I do not harm, wish well to all,
While drinking, drinking, drinking!

...

Karl Friedrich Müchler,

En kel' profunda sidas mi

tradukita de Joachim Gießner

En kel' profunda sidas mi
ĉe plenbarel' da vino
kaj antaŭ mi da vino ĝi
de bona origino.[2]

La vinkelist' laŭ oportun',
li ĝojas, se mi drinkas,
Boneghumore fartas mi -
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Soif' turmentas, ĉi demon',
ĝin devas mi forpeli.
Kaj tre efikas la propon'
per vino tion celi.

La mond' ŝajnigas nun, ke ĝi
sin rozkolore ŝminkas:
Boneghumore fartas mi -
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Sed la soifo kreskas nur
post ĉiu freŝa vino,
la konsekvenc' de la natur'
pro trinkofest' sen fino.

Konsolas min, dum sen konsci'
al planko mi nun sinkas:
Neniun suferigis mi,
sed trinkas, trinkas, trinkas.

...

Karl Friedrich Müchler,

Je plena glaso tie ĉi

tradukita de Karl Vanselow

Ĉe plena glaso tie ĉi
La zorgojn mi forgesis.
La vinon engorĝigis mi,
Sed la soif' ne ĉesis.

Do jam denove logas min
La glas' kun rea pleno.
Dum plu mi trinkas ankaŭ ĝin,
Revenas la ĉagreno.

....
....
....
....

....
....
....
....

Se ĉiam rekonstatas mi
Ĉe ĉiu plua guto,
Ke ĉiam plu kaj ĉiam pli
Bongustas ĉiu guto,

Min premas, kara amikar',
Dolore la konscio,
Ke devas mi rezigni, ĉar
Ne decas la ebrio.

...

[2]Mi, Manfred Retzlaff, proponas jenan ŝanĝon:
En kel' profunda sidas mi
ĉe plenbarel' da vino.
Ja estas vin' en tiu ĉi
de bona origino.

Traduko de la Germana poemo "Im tiefen Keller sitz ich hier" de Karl Friedrich Müchler *(∗1763-09-02 – †1857-01-12) en la Anglan de John Oxenford.*

Arg-944-1898 (2013-12-04 10:09:38)

Pri la tradukinto John Oxenford vidu la retejon `http://en.wikipedia.org/wiki/John_Oxenford`.

Traduko de la Germana poemo "Im tiefen Keller sitz ich hier" de Karl Friedrich Müchler *(∗1763-09-02 – †1857-01-12) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-944-1897 (2013-12-03 19:31:25)

Tiu ĉi traduko troviĝas sub "Weblinks" en la vikipedia paĝo `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_GieΓ§ner`. *La kanto estas interalie aŭdebla en* `http://www.youtube.com/watch?v=GvyJZoqzw-8`.

Traduko de la Germana poemo "Im tiefen Keller sitz ich hier" de Karl Friedrich Müchler *(∗1763-09-02 – †1857-01-12) en Esperanton de* Karl Vanselow *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-944-2130 (2014-06-09 12:55:12)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto, Elektita poezio por deklamo kaj kanto, Dua kajero de la unua serio, Dua Ardesia-eldono", verkita kaj eldonita de Karl Vanselow, sur la paĝo 119. Pri la tradukinto vidu la vikepediejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`.